

KONTRAKTO PRI LA KUNLABORO

inter

Pola Esperanto-Junularo, la junulara sekcio de Pola Esperanto-Asocio, registrita kiel asocio laŭ la pola leĝaro kun la nomo Polski Związek Esperantystów sub la numero KRS 0000304588, kies sidejo troviĝas ĉe la strato Gen. Władysława Andersa 37/59a, 00-159 Warszawa, Pollando, retpoŝtadreso: pej@pej.pl, nomata en la kontrakto PEJ, reprezentata de Romualda Jeziorowska;

kaj

Germana Esperanto-Junularo registrita kiel asocio laŭ la germana leĝaro kun la nomo Deutsche Esperanto-Jugend e.V. kies sidejo troviĝas ĉe la strato Katzbachstr. 25, 10965 Berlin, Germanio, retpoŝtadreso: dej@esperanto.de nomata en la kontrakto GEJ, reprezentata de Michaela Stegmaier

kaj

Itala Esperantista Junularo, la junulara sekcio de Itala Esperanto-Federacio, registrita kiel asocio laŭ la itala leĝaro kun la nomo de Federazione Esperantista Italiana, kies sidejo troviĝas ĉe la strato Villorosi 38, 20143 Milano, Italio, retpoŝtadreso: iej@esperanto.it, nomata en la kontrakto IEJ, reprezentata de Alberto Vitale

Artikolo 1

PEJ kaj GEJ, kiuj estas kunorganizantoj de la jarŝanĝa Esperanto-aranĝo “Junulara E-Semajno”, okazanta ĉiujare en la Meza Eŭropo; kaj IEJ, kiu estas ĉeforganizanto de la ĉirkaŭpaska Esperanto-aranĝo “Internacia Junulara Festivalo”, okazanta ĉiujare en Italio; esprimas sian emon kunlabori kadre de la menciitaj aranĝoj.

Artikolo 2

La celoj de la kunlaboro estas:

- 1) pliintensigo de la kontaktoj inter la junaj pollandaj, germanaj kaj italaj esperantistoj,
- 2) interŝanĝo de bonaj praktikoj,
- 3) plialtigado de la kvalito de la aranĝoj organizataj de PEJ, GEJ kaj IEJ,
- 4) partoprenigo de meritantaj esperantistoj en internaciaj junularaj Esperanto-aranĝoj.

Artikolo 3

La kunlaboro estas realigata precipe per la organizado de la t.n. interŝanĝoj. La kondiĉojn de tiuj interŝanĝoj reguligas tiu ĉi kontrakto en la postaj artikoloj. Aldonaj formoj de la kunlaboro estas realigeblaj kondiĉe de triflanka akcepto esprimita en skriba formo.

Artikolo 4

Ĉiujare PEJ kaj GEJ kunlabore garantias al du membroj de IEJ, indikitaj de la estraro de IEJ, senpagan partoprenon en “Junulara E-Semajno”. La senpaga partopreno signifas, ke por la koncernatoj la jenaj kostoj estas kovrataj de la gastigantaj organizoj, nome PEJ aŭ GEJ:

- a) aliĝkotizo (laŭ la plej frua aliĝperiodo),
- b) programkotizo (ne inkluzive de eblaj ekskursoj),
- c) manĝkotizo,
- d) loĝkotizo – en la plej malmultekosta kategorio, por loĝado en hotelo aŭ junulargastejo.

PEJ kaj GEJ ne kovras vojaĝkostojn.

Artikolo 5

Ĉiujare IEJ garantias al unu membro de PEJ kaj unu membro de GEJ, indikitaj respektive de la estraroj de PEJ kaj de GEJ, senpagan partoprenon en "Internacia Junulara Festivalo". La senpaga partopreno signifas, ke por la koncernato la jenaj kostoj estas kovrataj de la gastiganta organizo, nome IEJ:

- a) aliĝkotizo (laŭ la plej frua aliĝperiodo),
- b) programkotizo (ne inkluzive de eblaj ekskursoj),
- c) manĝkotizo,
- d) loĝkotizo – en la plej malmultekosta kategorio, por loĝado en hotelo aŭ junulargastejo.

IEJ ne kovras vojaĝkostojn.

Artikolo 6

La gastiganta organizo povas postuli surlokan helpon dum la aranĝo de la homo kiu partoprenas la aranĝon kadre de la interŝanĝo priskribita en tiu ĉi kontrakto. La helpo ne rajtas malebligi al la koncernato efektivan partoprenon en la aranĝo.

Artikolo 7

1. La maniero elekti homon kiu partoprenos en la koncerna aranĝo estas interna afero de la estraro de la sendanta organizo. La sendanta organizo garantias nur, ke:
 - a) la elektito(j) estas membro(j) kaj prefere ne estrarano(j) de la sendanta organizo,
 - b) la elekto estis farita etike kaj sendiskriminacie.
2. preferitecon en la elekto havu meritantaj esperantistoj, kvankam la elektito(j) ne devas aparteni al tiu kategorio.
3. la sendanta organizo povas rezigni pri la elekto de persono por la interŝanĝo, sed tia rezigno ne nuligas la rajton de la alia(j) organizo(j) elekti kaj sendi persono(j)n por la sekvonta aranĝo.
4. En urĝaj kazoj PEJ kaj GEJ rajtas transdoni lokon al la dua organizo.

Artikolo 8

1. La limdato por sciigi la gastigantan organizon pri la nomo(j) de la partoprenonto(j) kaj transdoni aliajn informojn, kiujn devas liveri ankaŭ ceteraj aliĝintoj, estas unu monato antaŭ la komenco de la koncernata evento.
2. La sciigo devas okazi skribe. Validas ankaŭ retroŝta sciigo per la supraj retadresoj.

Artikolo 9

La kunlaboro komenciĝas en la momento de la triflanka subskribo de la kontrakto. La unuaj interŝanĝaj aranĝoj estu IJF en 2018 kaj JES en 2018/2019.

Artikolo 10

La kondiĉoj menciitaj en tiu ĉi kontrakto estas ŝanĝeblaj, sed nur kaze de la akcepto de ĉiuj flankoj de la kontrakto, esprimita en skriba formo. Validas ankaŭ retroŝta sciigo per la supraj retadreso.

Artikolo 11

1. Nuligo de la kontrakto kun tuja efiko eblas kiam unu el la flankoj de la kontrakto sciigas la aliajn flankojn per skriba formo kaj estas plenumitaj samtempe ĉiuj jenaj kondiĉoj:
 - a) la interŝanĝo priskribita en tiu ĉi kontrakto okazis samofte dum IJF kaj JES;
 - b) PEJ kaj GEJ kune havis la eblecon sendi la saman kvanton de partoprenantoj kiel IEJ;
 - c) la sendanta(j) organizo(j) de la plej baldaŭa aranĝo ankoraŭ ne indikis partoprenonto(j)n.
2. Se la kondiĉoj de la tuja nuligo ne estas plenumitaj, la nuligo ekvalidas nur kiam ili plenumiĝos.
3. Tuja nuligo de la kontrakto eblas ankaŭ kaze de la triflanka akcepto, esprimita en skriba formo, tiam sen rigardo al art. 11.1.

Artikolo 12

Kaze de miskomprenoj kaj interpretaj problemoj pri la kontrakto, oni devigas reprezentantojn de PEJ, GEJ kaj IEJ trovi solvon. Se la problemo estas nesolvebla fare de PEJ, GEJ kaj IEJ, la problemon prijuĝas arbitre la Universala Esperanto-Asocio.

Artikolo 13

La kontrakto estas subskribata en tri identaj ekzempleroj. PEJ, GEJ kaj IEJ ricevas po unu ekzempleron.

Subskriboj de la reprezentantoj:

Nome de **Pola Esperanto-Junularo**

Romualda Geciorowska

Loko kaj dato:

Szczecin, 31.12.2017

Nome de **Germana Esperanto-Junularo**

M. Hegner

Loko kaj dato:

Szczecin, 31.12.2017

Nome de **Itala Esperantista Junularo**

Alberto Vito

Loko kaj dato:

TORINO, 30-01-2018